

"Estimata? Tiun vorton ni ankoraŭ ne lernis. Mi ne komprenis. Vortaron mi ankoraŭ ne aĉetis. Mi estis ĉe la sesa leciono. Kolombo estas birdo. Leono estas besto.

"Ĉu sinjoro? Mi ne estas sinjoro. Mi estas knabino. Mi havas dek ses jarojn. La instruistino preferas aŭdi 'Mi estas dek ses-jara....'

" - Ĉu el Japanio? - miris la panjo.

"Dika silento regis en la kuirejo dum mi legis. La legado daŭris. Dum la legado mi estis ie alie. Ŝi sentis tion. En la lasta linio mi revenis....

" - Kiu skribas al vi?

" - Iu sinjoro, esperantisto el Japanio....

"Tiu onklo estos nur la mia. Bela sento de aparteno. Sen mia helpo neniu en la familio povus kompreni tiun leteron. Plezureto." [*Geografio de miaj memoroj*, p. 7-8]

En Zagrebo ŝi eniris la universitaton kaj studis slavajn lingvojn, sed neniel forlasis Esperanton. En 1972, ŝi efektive fariĝis profesia Esperantisto, kunfondante la Internacian Kulturan Servon en tiu urbo. Tie ŝi plentempe laboris dum du jardekoj. Aparte lerta organizanto de kulturaj aranĝoj, ŝi, inter aliaj, famigis la Pupteatran Internacian Festivalon.

Ofte partoprenante aranĝojn en diversaj mondpartoj tiutempe, ŝi kompreneble konatiĝis kun multaj Esperantistoj. Baldaŭ komenciĝis kun alilandano gepara rilato, kiu famiĝis en 1984 pere de ŝia debuta verko en Esperanto, la "sorĉe bela kaj obsede originala" romano *Ombro sur interna pejzaĝo*. Ties unua frazo entiras nin en la mondon de tiu sesjara interrilato, ĵus disiĝinta:

"Mi fartis iom kiel uzita glubendo kiun oni klopodas reuzi sed ĝi ne plu fikstenis...." [p.9]

Kelkajn paĝojn poste, ŝi frape elegante resumas siajn sentojn:

"Kiam li foriris li forportis nenion krom tajpilo. Kiam li fermis la pordon post si, mi sentis min komplete priŝtelita." [p.13]

Pri siaj talento kaj motivo por verki en Esperanto, ŝi diris frue en la kariero:

"Mi ne estas grand-formata aŭtoro. Ĉu mi verkas aŭ ne, mia nacia lingvo kaj la literaturo en ĝi bone fartas. Sed se mi verkas en Esperanto, eble mi iom kontribuas al ĝia riĉo. Eble la literaturo en Esperanto per mia teksto havos unu tavolon pli. Eĉ se tre maldikan." [*Ombro*, 4a kovrilo]

Sed post tiu unua romano ade aperis aliaj tre diversspecaj verkoj, kiuj preter ajna dubo ja riĉigas nian literaturon eĉ per kelkaj — kaj apenaŭ maldikaj — tavoloj.

Pri eventuala rolo en la Esperanto-movado, ŝi iam provis klarigi:

"En la movado mi neniam emis aktivi.... Mi decidis atenti kaj ne lasi min entiri en ĉion, kion Esperanto volis de mi. Foje mi sukcesas.

"Mi ne cedis al ĝi laŭ la kutima movada maniero. El ĝi mi klopodis elstringi pli: kiel kunligi Esperanton kun mia kultura agado. Pri tio mi esploras du jardekojn. Foje surprize sukcese, foje senespere humilige.

"Ekstermovadulo mi estas." [*Geografio*, p.130-131]

Ekster la movado ŝi ja nelacigeble kaj inventeme aktivas. Krom diversaj kulturaj aranĝoj, post la korŝira milito en sia lando, ŝi organizis programojn por rekonstrui domojn kaj prizorgi orfojn kaj handikapitajn infanojn.

Sian perspektivon sur tiu milito ŝi kortuŝe diskonigis en *Kroata milita noktlibro*. Dum la milito ŝi profitis valorajn kontaktojn, plusendante gravajn mesaĝojn kaj liverigante bezonataĵojn al la fermita kaj sieĝita urbo Sarajevo. En 1994 ŝi ricevis la premion de la FAME-Fondaĵo pro "plurjara engaĝo utila al subteno de internaciaj kompreniloj."

En la lastaj jaroj ŝi multege laboras, starigante en heredita familia hejmo Esperanto-kulturdomon ne malproksime de Zagrebo.

Ŝi ja sekvas propran vojon, sed apenaŭ preteratentas movadajn aferojn. Ekzemple, ŝi estas la konstanta sekretario de la Kroata Esperanto-Ligo kaj lastatempe multe klopodis allogi al Zagrebo la Universalan Kongreson en la jaro 2001. En 1997, oni elektis ŝin al la Akademio de Esperanto.

Hodiaŭ oni povas pravige diri pri ŝi same kiel ŝi diris pri sia protektanto kaj multjara kunlaboranto Tibor Sekelj en 1989:

"...por li Esperanto ne estis duagrada varo,... ĝi estas integra parto de lia viv-koncepto ... Esperanto estis por li reale palpebla same kiel por li estis reala kaj atingebla kaj muldebla la mondo mem. Esperanton kaj la mondon li ne traktis aparte. Li kunligis ilin, alproksimigis ilin unu al la alia, kaj trapektis per ili sian vivon." ["Tibor Sekelj," p.3]

En la serbkroata lingvo 'Spomenka' estas nomo de floro: en Esperanto "miozoto," tiu delikata blua floreto kromnomita "neforĝesumino." Certe karan Spomenka ni ne forĝesos. Ŝi iam diris: "Esperanto estas realigo de la bono. Mi kredas je la bono." [citita en *Tena*, p.104] Kaj al tiu bono ŝi sindone dediĉis sian vivon.

Pro tio ni tutkore dankas al ŝi. Ni daŭre rigardu al ŝiaj verkoj por atentigoj pri la vero en ĉiutagaĵoj kaj al ŝia vivo por sekvindaj ekzemploj de Esperanto serve al la homaro.

Hodiaŭ, do, kara Spomenka, ni dankeme festas viajn unuajn kvindek jarojn kaj ĝoje bondeziras al vi kvindek pliajn. Feliĉegan naskiĝtagon!

— Bill MAXEY
Powhatan, Virginio, Usono

Profesie, Bill Maxey estas instruisto sed nun li laboras nur parttempe. La plejmulton de sia tempo li dediĉas al Esperanto. Nun 50-jara, li festas la kvinan datrevenon de sia esperantistiĝo. Jam kvarfoje li partoprenis la konatan tri-semajnan somerkursaron ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato. Tie oni inspiris lin ekaktivi en la movado. La unua paŝo tiudirekten estis partopreni la 3an Amerikan Kongreson en Kostariko en 1996, kie li akceptis respondecon por la kunordigo de korespondpetoj en Ameriko kaj la ĝemeligo de Esperantaj grupoj en diversaj lokoj. Ĉiujare li revenas al Mezameriko, vizitante Esperantistojn por renkonti, kuraĝigi, kaj instrui ilin. En la lastaj du jaroj li kunlaboras kun Normand Fleury, el Montrealo, por realigi la ĉiujaran aŭtunan E-renkontiĝon en Vermonto. Tie li kutimas ankaŭ instrui la post-bazan kurseton kaj prelegi pri diversaj temoj. Pasintoktobron li elektis la zamenhofan homaranismon, la poemon "La infana raso", kaj Esperanton en Sudameriko. Nuntempe li estas membro de la ELNA komitato kiu prizorgas la someran kursaron en San-Francisko kaj ankaŭ ties komisiito al la UEA komisiono por Ameriko. Aldone, en la pasinta kaj nuna jaroj li instruas Esperanton al 40 infanoj en la 2a kaj 3a klasoj. La 23an de januaro li foriris al Sudameriko por partopreni la tut-amerikan kongreson de Esperanto (TAKE) en Bogoto kaj poste viziti Esperantistojn en kvin aliaj landoj. Li revenas nur la 18an de marto.



Noto de la redaktoro: Ni bedaŭras informi ke Radio Verda, la ĉiusemajna programo tutmonde atingebla per la interreto, devis ĉesi je la 24-a de januaro la kreadon kaj elsendadon de programoj. Aaron Chapman kaj sia kunlaborintino en Otavo uzis tekstojn kiaj tiu de Bill Maxey por krei ĉiam interesajn programetojn. Tamen ade mankis al ili sufiĉe da materialo por havebligi bonajn elsendojn. Ni kiuj aŭskultis kaj ĝuis la profesie prezentitajn programojn esprimas ne nur bedaŭron sed ankaŭ dankemon al tiuj bravuloj pro siaj iniciatemo kaj bona laboro.

SOLVO AL LA JANUARA MENSOSTREĈILO:

Estas vere, ke en la jaro 1914 Kristnasko kaj unua tago de la nova jaro ne estis je la sama tago de la semajno. Tamen mencio de la jaro 1914 estis nur trompo. En neniu jaro okazas Kristnaska tago kaj la unua de januaro en la sama semajntago. La samtageco estas nur inter Kristnasko en unu jaro kaj, post sep tagoj, la unua de januaro en la sekvanta jaro.

“Amu la veron sed pardonu la eraron. Ne la amo estas blinda sed la sinamo. Filozofa sen sincereco estas nur politikisto.” — Voltaire. Esperantigis Bertil Englund, *Kancerkliniko* 83, jul.-sept. 1997. [Ĉu la sama Voltaire ne ankaŭ diris, ke Kanado estas nur kelkaj hektaroj de glacio kaj neĝo? — Steĉjo]